A. L. — <i>Inaŭguro de la Esperanta Monumento sur la tombo de Juul Karnas</i>	69
<i>Bibliografio</i>	15, 25, 46, 61, 77, 93, 109, 140, 156, 173, 189
Celano L. S. — <i>Esperantista edziĝo</i>	88
<i>Ĉu ursoj sinmortigas?</i>	42
<i>Dankesprimo</i>	80-177
<i>Diversaĵoj</i>	27, 89, 107, 123, 138, 151, 171, 187
<i>Esperantista Sipveturado al Vlissingen</i>	20
<i>Gratuloj</i>	29, 48, 62, 94, 173
<i>Grupa Vivo</i>	15, 29, 46, 62, 78, 95, 110, 126, 141, 157, 174, 190
<i>Internacia menulingvo</i>	35
<i>Komunikoj</i>	14, 64, 65, 81, 97
<i>La angulo de la sertemuloj</i>	112, 128, 143, 144, 160, 176, 191
<i>Leterkesto</i>	48
<i>Momenton ni ridu</i>	45, 80, 94, 125, 137
<i>Nekrologo</i>	48, 62, 94, 109, 141, 156
<i>Organiza Komitato (La) — Al la gekongresintoj</i>	8
P. A. S. — <i>Kritiko</i>	183
<i>Peto</i>	154
<i>Por nia propra skribmaŝino</i>	106, 126, 140, 173
<i>Pri lingva demando</i>	109
<i>Radio</i>	78
<i>Rezultatoj — ekzamenoj</i>	9
<i>Subteno por la Revuo</i>	94, 106, 126, 140, 173, 180
<i>Voor het Graf van Juul Karnas</i>	55-71

ILUSTRAĴOJ

	<i>Paĝo</i>
<i>Gent</i> — Malantaŭa — Falĉilo	73
— Gotikaj Konstruaĵoj	75
— Malgrand' beginejo	86
— Muzeo de antikvaĵoj	87
— Haloj — Belfrido — Urbdomo	101
— Drako	102
— Sta Bavo — Abatejo	117
— Turista panoramo	118
— Grafa Kastelo	132
— Haloj — Belfrido — Urbteatro	148
— Ĉefpreĝejo — Sta Bavo	150
— La Tureto	165
— La granda Kanono « Dulle Griet »	166
Partoprenantoj de la 6a Kongreso	3
Tombo de Juul Karnas	70

kaj ĝuis de ĉiuj feliĉoj de kiuj li konservis la memoron.

Ĝis tiam li amis la ĝinon pro gusto ; nun li ekkomencis ĝin ami pro dankemo, kaj li ĝoje reiris al sia laboro, firme decidita uzi salajron por trovi sian Melinade'n. Aliulo estus nekonsolebla, estante malbela unuokululo, post kiam li posedis du belajn okulojn ; suferante la aĉaĵojn de la fiŝvendistinoj de l' palaco, post kiam li estis favore rigardata de nobela princino, kaj, estante je la servoj de ĉia burĝo de Bagdad, post kiam li regnis sur ĉiuj spiritoj ; sed Mesrur ne havis la okulon kiu vidas la malbonan flankon de la aĵoj. Kiom da homoj estus feliĉaj se ili forgesus tiel facile la belajn revojn, kiujn farigas al ili la Fortuno !

Tradukis : Edg. VERHEYDEN.

Aŭtuno

(DE STIJN STREUVELS)

La printempo, la rava printempo kun sia belego de multkoloraj floroj — la freŝa vekigo de ĉiuj vivantaj aĵoj, la burĝonado de la juna jaro, — jam de tro longe forpasis. La ĉarmo kuŝas malproksime en la perspektivo de nia rememoro, kun ĉiaj aliaj foraj aĵoj. En nia memoro la lukso de tiuj printempaj tagoj iĝis beleco plialtspeca — transrorĉita al viziono plena je ŝanĝaj bildoj, en travideblaj koloroj kaj ĉirkaŭnebulita per dolĉa lumkrepusko : beleco kiu vaporigis kaj ne estas plu tuŝebla se nur per la sopiro de niaj pensoj kaj kun la intima bedaŭro ke tio estas aĵoj kuŝantaj en la pasinteco.

La venonta printempo estas ankoraŭ tro malproksima kaj alportos ja ion alian, ĉar ĉio ĉirkaŭe alprenas diferencon formon kaj proporciojn, — nia vivo balanciga inter du ekstrecoj : sopiro al la ŝanĝokaj malĝojo pro la ŝanĝo.

La somero mem staras en la memoro pli proksima al ni, ĝi vivas ankoraŭ en nia korpo ; la forta heleco brilas ankoraŭ en niaj okuloj, la heleco de tiu bela serio de longaj suntagoj.

Ni observis ilin, unu post alia, kunvivis kun ili kaj ĝojigis pro ili, tiel ke tiu somero estis kvazaŭ la estado mem, la kaŭzo de la vivo kaj de la belo.

Nur rememoru la triumfan iron de la suno ĉiun fruon matenon, la brilan sunbildon kiu kiel rado suprenveturas en la aeron, iras fikse sian vojon, kaj pendiĝas glorie, alten en la bluo, la senmakula bluo de l' cielo, superradiante la purajn horizontojn ĉirkaŭ la mondo. Nur sentu la varmegon de la tagmezo kaj la silenton de tiuj horoj. Ĉu ni ne portas en ni la rememoro pri nenombrebla sinsekvo de vesperoj, kiam la tago malklare mortis kaj montris ĉiufoje novan mirindajn en la okcidento ? Kaj la bluaj noktoj, la luno, la steloj, la silento en kiu ĉiu bruo, la plej eta susuro emociigis vian koron, kaj kiel iu skua okazaĵo vekis eĥon en via animo.

Ni kapablas ankoraŭ reprezenti al ni la someron, palpebla kaj viva. Ni observis la kreskon de la fruktoj ; la superfluo kaj la riĉeco etendiĝis al la malproksima horizonto, niaj okuloj ne povis transvidi la abundon. La varma spiro de la suno donis la vivon kaj la kreskon al la plantoj kiuj sternis sian kolorecon sur la mondon ; kaj el tiu

pompa lukso trankvile kaj malrapide maturiĝis la semitaĵoj kiuj estiĝos la vivrimedoj por homo kaj besto. Ĉio iris sian belan vojon, laŭ leĝo kaj saĝa aranĝo de la Granda Reganto.

Por la kulturisto, la tagoj estis nun tuto da streĉa okupo, plenplena de l' mateno ĝis la vespero ; ĉiame li sciis kion fari, kaj faris kio estis farenda. Tempon por ĝui la belecon kaj la gloron de tiu somero la homoj ne havis. La graveco videbliĝis sur iliaj vizaĝoj kaj ĉiuj aĵoj ĉirkaŭ ili kvazaŭ nur ekzistis rilate al alia vivo kaj pro nura neceseco.

Rememoru kiel la timo ĉiam ree kaptis la homojn, kiel ĉiu fulmotondro, ĉiu veteraĉo ŝajnis al ili puno kaj minaco kiu povus forrabi ilian posedaĵon. Ĉar kion ĉiu por si semis, ili konsideris kiel apartenaĵon kaj la sunbrilon kiu maturigis iliajn fruktojn, ili ricevis de Dio donace kaj senkompanse. Tuj kiam la plantoj finkreskis ĝis matureco, neniu hezitis enfrapi sian falĉilon, ĉiu en la siajn, kaj la greno kaj ĉio kion la somero produktis estas faskigata, ligata, amasigata kaj sur altŝarĝitaj ĉaroj transportata en la grenejojn.

Estis neniu el ili kiu turnis la kapon aŭ rerigardis la teron kiun ili prirabis kaj nuda postlasis. Tiel rapide kaj neatendite tio okazis, kaj tiel nereconebla la tero tuj estiĝis, ke neniu povis ankaŭ vidi kiel proksima estis la fino kaj kiel nun la somero subite finfestis. La kampoj kuŝas nudaj en sia ebena tero. Duoble vasta ŝajnas nun ebenaĵo kaj nemezurebla, al la kvar ventregionoj etendiĝas la spaco ĝis en la horizonto. La kreskado abrupte ĉesis kaj la tuta rikolto kuŝas kunigita en la stakoj kiuj kiel pezaj rondaj turoj, pli altaj ol la tegmentoj, elpintas super la farmojn de la kulturistoj. Tie estas kaŝita la beleco, kolektita la boneco de la somera varmego, kaj ŝajne la rezulto de ĉio... ; estas la multeco, la abundo de la sunsomero kiu utilos kiel vivsubteno dum la morta sezono kiu ekvenas. La produkto de la beleco estas destinita kiel nutraĵo por homoj kaj bestoj. Por tio servis tiu tuta pompo, tiu febra okupo, tiu laboro kaj penado... por daŭrigi la vivon dum la morto, por traŭrigi la tempon kiam la suno forestos kaj ĉio en morteca dormo kuŝos dronigita ; por atendi la horon de la nova reviviĝo.

Vidu kiel mortaj kaj palaj, kiel forlasitaj estas la kampoj ; kiel la farmoj staras kovritaj kaj fermitaj malhele kontraŭ la aero ; kiel ĉiu vivo kaŝiĝis interne de la baroj de la muroj kaj sub la sekurecon de la malalta tegmentaro. Tie ĉi la homoj laboris dum la tuta somero, en severa persistado ili forvivis siajn tagojn ; ilia tasko plenumiĝis, la provizo estas eneĝigita, nun ili ne plu povas ion fari ; la tempo de la laboro estas for, kaj la granda, longa, ĝenerala ripozo komenciĝis. Ke la elementoj nun estru super iliaj kampoj ; la pluvoj kaj torentoj nenion plu trovos por detrui ; la akvo igos la teron mola kaj grasa kaj favora por la semado en la printempo. La riĉaj farmistoj malmulte interesiĝas pri tio ! Ili sidas varme kaj seke, bonhumoraj kaj sekuraj en sia abundo, konsciaj pri tio ke ĝi estas plene meritita.

Super la tuta naturo la aspekto estas grandioza kaj trankvila ; nun restas la longa paŭzado en la rotacio de la ĝenerala vivo kaj faro — la nebulo sterniĝos kiel kovrilo kaj vualos ĉion en griza malklareco.

La gloro de lumo kaj vivo finfestis, sunbrilo kaj bluaj spacoj estas estintaj. Jes, nun estas vere la konvena tempo por ripozi ; kaj kiu pene laboris povas honeste ĝin ĝui.

Ni, kontraŭe, kiuj ĝuis la somertagojn, kiuj nenion alian faris la longajn tagojn, ol ebriigi nin per la okuloj, pri la pompo, lukso, la gloro de la somera aspekto, — ni, kiuj vivis de tio kiel de daŭra festo, ne satigitaj, kaj en nia ebria ĝuo ĉiam pli multon dezirantaj — tiel ke ni surpriziĝis pro la abrupta fino, kaj sentas ankoraŭ en la koro la melankolion pro la beleco, tro mallonga kaj jam ree for — ni kiuj nenion alian faris ol palpi la riĉaĵojn, naĝi en la abundo, trinki el la multo, ĉerpi el la senfineco, kaj kolekti la gloron kiu ŝajnas daŭra, ne kunhelpante al la transformado de tiu beleco al manĝebla vivsubteno — dum la homoj kiuj penis tiun tutan tempon, nun ripozas — venas al ni la senlumaj noktoj, la malhelaj tagoj por eklabori ; por transformi la kolektitan belecon al tuŝeblaj produktoj kiuj provizos kontenton kaj ĝuon al tiuj kiuj povos ripozi. Nia laborvico nun komenciĝis.

Vidu ! la aero estas tute griza, la folioj putriĝas sur la arboj ; la verdo rustiĝis, velkiĝis, flava kaj pala, la horizonto estas plena je nebulo kaj la vojoj neireblaj, la tero estas kiel dezerto, la nigraj kornikoj traflugas la aeron.

Fermu la fenestrojn, mallevu la kurtenojn, bruligu la fajron, la lamplumo atendas...

Belaĵoj el mia rememoro, aĵoj de intimeco, nebulo de melankolio kaj dolĉa malĝojo ; la tuta mondo de mia sopiro kiu vivas en mia imago. Mi devas translabori.

Pensu ke vi estas teksisto kiu sidas sur via teksilo kaj teksas ; kiu el la kruciĝoj kaj kurbiĝoj de la fadenoj de varpo kaj vefto faras la bildojn kiuj vivaj kaj kolorriĉaj aperas en teksaĵo kaj malrapide ruliĝas sur la cilindro kie ili devas fariĝi : la ŝtofo nepereigebla, la drapo multkolora, la tuko sur kiu la plena vivo estas pentrita.

En Novembro, 1907.

Kun la afaba permeso de l'aŭtoro tradukis D. Mortelmans, Wilrijk.

Diversaĵoj

En la numero de Septembro de « Anti-Kapitalistisch Blok », ni legis kun plezuro artikolon pri Esperanto, skribita flandralingve de nia simpatia amiko Piet Van Peel el Antverpeno. Per trafaj vortoj, li faris taŭgan propagandon por nia lingvo, kaj instigis la legantojn de la gazeto, sekvi kurson.

La redakcio de F. L. dankas nian Piet pro lia bona ideo kaj lia senlaciegebla kuraĝo !

* * *

Post longa atendado, la jarlibro de U. E. A. fine vidis la lumon. Kvankam ĝi ampleksas nur la duonon de la eldono 1934, ĝi tamen estos tre bonvena pro la propaganda kaj informa valoroj kiujn ĝi prezentas.

La statistiko 1935 montras por nia lando 196 aktivajn membrojn kaj 266 simplajn membrojn.

La plej forta U. E. A.-movado troviĝas en Francujo, kun 671 a.m. kaj 3.094 s.m. Svedujo, unu el la landoj kie Esperanto floras, nombras nur 81 aktivajn U. E. A.-anojn !

La listo de la esperantistaj landaj asocioj ne mencias Flandran Ligon.

Estas la unua volumo prizorgita de la nova direktoro S.ro Goldsmith, kiu transprenis la oficon en konfuza periodo, kaj tamen sukcesis atingi kontentigan rezulton.

* * *

En « Haagsche Post » aperis ankaŭ alia artikolo de Pastro Cseh, koncerne UEA, el kiu parto tekstas jene:

« La sensprita aŭtokrata reĝimo, inaŭgurita de S.ro Robert Kreuz, » kaj subtenata de kelkaj diktatoremaj personoj, malgraŭ streĉaj » klopodegoj tute fiaskis, kaj nun, post la morto de S.ro Kreuz, » oni staras ĉe la financa kaj morala ruiniĝo de la internacia orga- » nizo. »

La nederlandaj ĉefdelegito kaj vic-ĉefdelegito dissendis cirkuleron por publike demandi ĉu estas dece kaj en la intereso de nia movado ke pastro Cseh tiamaniere atakas mortintan laboreginton, kiu ne plu povas defendi sin.

Certe ne estas dece nek korekte ataki mortinton, despli ĉar ne estas S.ro Kreuz kiu kulpas pri la bankrotiĝo de UEA. Pri la aŭtokrata reĝimo kaj la diktatoremaj personoj en UEA kaj ICK ankaŭ nia ligo havis kelkajn spertojn, sed tio estas alia afero.

* * *

ESPERANTAJ POŝTKARTOJ EN AŬSTRIO !

Aŭstria poŝto ĵus eldonis 50 diversajn bild-poŝtkartojn kun Esperanto-teksto

La Aŭstria Esperanto-movado estas feliĉa, noti nun novan gravegan sukceson en sia batalo por enkonduko de Esperanto kiel urĝe necesa helprimedo de l'internacia trafiko : la Aŭstria Generala Direkcio de Poŝtoj kaj Telegrafoj en Wien ĵus eldonis novan serion da oficialaj poŝtkartoj por korespondo kun la eksterlando (kun enpresita poŝtmarko de 35 groŝoj) surhavantaj maldekstre sur la adresflanko 50 diversajn bildojn de tipaj Aŭstriaj pejzaĝoj kaj vidindaĵoj kun klariga teksto en la lingvoj germana, franca, angla kaj en *Esperanto*.

El *Wien* sur tiu serio estas vidataj la vidaĵoj de Ringstrasse, de Schönbrunn, de Karlskirche, Stata Operejo, Schwarzenberg-placo kaj Belvedere. *Malsupra Aŭstrio* : Baden apud Wien, Melk, Semmering, Burgo Aggstein, Puchberg apud Schneeberg kaj Otscher. *Supra Aŭstrio* : Traunkirchen, St. Florian, Gosausee-Dachstein, Steyr, Hinterstoder, Mondsee. *Salzburg* : Hofgastein, Badgastein, Grossglockner Transalpa ŝoseo, Lofer, Zell am See, urbo Salzburg. Ankaŭ la ceteraj federaciaj landoj de Aŭstrio estas reprezentataj per la plej belaj regionoj.

La preparaj paŝoj por la eldono de Esperanto-poŝtkartoj en Aŭstrio datiĝas de Septembro 1934, kiam kortega konsilisto *Hugo Steiner*, okaze de aŭdienco ĉe la ministro por komerco kaj trafiko sinjoro *Fritz Stockinger*, sukcesis interesi kaj gajni tiun eminentan amikon de Esperanto por tiu ideo. Kiel plej supera ĉefo de l'poŝta administrado, sinjoro ministro instigis la ĝeneralan direktoron de poŝtoj kaj telegrafoj okupiĝi pri la demando kaj intertrakti pri ĝia efektivigo kun la prezidantaro de Aŭstria Esperanto-Asocio. Sekve de tio sam. *Hugo Steiner* kune kun sekcia ĉefo d.ro *Franz Ubelhör* plurfoje intervenis pri ĉi tiu afero ĉe ĝenerala direktoro, sinjoro *Julius Ritter von Stejskal*.

Nun do ankaŭ Aŭstrio eniris en la vicon de la ŝtatoj, uzantaj oficiale Esperanton en la poŝta trafiko kaj ĝi faris tion en amplekso pli vasta ol ĝiaj antaŭirintoj ; ni esperu, ke tiu modela ekzemplo de Aŭstrio jam baldaŭ instigos aliajn ŝtatojn al imito ! Samideanoj en ĉiuj landoj estas insiste petataj, publikigi pri tiu grava sukceso de nia movado *raportojn en la nacia gazetaro* kaj sendi unu pruv-ekzemplaron al Internacia Esperanto-Muzeo, Wien ; ĉiu sendinto ricevos danke serion da belaj gvidiloj tra Aŭstrio.

KURSGVIDANTOJ !!!

Vi deziras por viaj lernantoj malkaran, praktikan esp. lego- kaj lernolibron ?

Mendu tuj binditan Jarkolekton de : « *La Juna Vivo* » (200-paĝa libro en arta kovrilo). La prezo estas nur : 16,— B. fr.

Grupoj ricevas rabaton !

Petu senpagan specimenon de « *La Juna Vivo* » ! (Red. : West-Grafdijk, NH, Nederlando).

POR NIA REVUO :

Subteno D. K. M., Antwerpen	1 Fr.
Subteno Fr. D., Gent	25 Fr.

POR NIA PROPRA SKRIBMASINO

L. v. d. B., el Eindhoven	5 Fr.
P. D. C., el Aalst	5 Fr.
A. V. D. B., el Eindhoven	5 Fr.
Ruselara Esperantista Grupo	20 Fr.

* * *

Varbu por Via Revuo !

Bibliografio

(Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias. Verkoj, senditaj al aliaj adresoj ol Redakcio, Administranto aŭ Flandra Esperanto-Instituto estos ignorataj.)

« *LA JUNA VIVO* », 2a Jarkolekto 1935-36. Havebla ĉe Flandra Instituto. Prezo : 16 B. F.

Tre interesa preskaŭ 200-paĝa libro. Gi estas certe same interesa kiel legolibro kaj kiel lernolibro. La kurso, kiun ĝi enhavas, estas

preskaŭ io nova. Nur per mallongaj klarigoj ĝi donas la gramatikon. Tutsimple pere de multaj kaj klaraj ekzemploj, la lernantoj iom post iom kaptas la regulojn. Tiu sistemo certe tre taŭgas por infanoj, sed ofte ni jam spertis, ke plenkreskuloj, kiuj sekvas esperantan kurson, kelkajn jarojn post la forlaso de la lernejo, ofte nenion pli rememoras pri gramatiko. Do ankaŭ por tiuj kursoj, la metodo estas bonega. Ni varme instigas la kursvidantojn fari estonte la pruvon. Ili certe ne bedaŭros ĝin.

Grupa Vivo

AALST. — LA PIONIRO.

Kelkaj Pioniranoj biciklis al la Esperanto Domo en Arnhem. Ili interkonatiĝis kun gesamideanoj el 7 diversaj landoj, i. a. S.roj Pastro Ce, Schmidt, F.ino Isbrucker. Ili pasigis agrablan libertempon. Dumtage ili faris ekskursojn en la ĉirkaŭaĵo de Arnhem sub la gvidado de simpatia samideano el Arnhem, vespere ili sin amuzis en la komforta salono de la Esp. domo.

Bedaŭrinde ke la tempo tiel rapide forflugis.

ANTWERPEN. — FLANDREMA GRUPO ESPERANTISTA.

Tiun-ĉi monaton nia grupo bonege laboris ĉar ĉiun semajnon senescepte ni kunvenis por nin pliperfektigi en nia lingvo. Oni tradukis, diskutis por fari la plej bonan propagandon, priparolis diversajn punktojn k. t. p. Nia fidela membro S.ro Van As parolis pri sia partopreno al la Viena Kongreso, kiu estis tre interesa. La ekskursoj estas finitaj, domaĝe : la plej granda nombro tre bedaŭris tion, precipe ĉar ili ĉiuj bone sukcesis. Sed de nun ni komencos labori por la sukcesigo de nia kristnaskfestoj, ĉar certe tio estas bona propagando por nia movado.

OSTENDA GRUPO ESPERANTISTA.

Baldaŭ la fremdul-sezono finiĝos por Ostendo, kaj la tempo alproksimiĝas por organizi novan vintran kurson. Kiel ĉiujare niaj biciklaj veturadoj bone sukcesis. La vizititaj lokoj i. a. estis : Lophem, Kemmel, Bruĝo, Diksmuide kaj Veurne. Dum la monato Aŭgusto ni havis la plezuron renkonti multajn fremdajn esperantistojn el Nederlando, Anglujo, Francujo kaj Aŭstrio.

Interesa laŭ nia vidpunkto estus kolektaĵo de fotoj de la grupoj de Flandra Ligo. Tial ni proponas al la grupoj interŝanĝi grupofotojn, kiuj estus konservataj en la grupalbumoj. Tia kolektaĵo estus ankaŭ tre taŭga kiel propagandilo por interesuloj de nia lingvo. La grupoj, kiuj volas interrilati kun ni pri tio, skribu al Esperantista Grupo, Oudenburgsche Steenweg, 8, Ostende.

RONSE. — LA PACA STELO.

Ĉirkaŭ meze de tiu-ĉi monato, ni organizas denove 2 kursojn kaj bone laboras por ilin sukcesigi.

Ankaŭ la grupo sin preparas por inde rememori la « librotagon » kaj ne mankos je eventuala alaĉeto de kelkaj belaj volumoj ĉe nia instituto.

Nia ŝparkaso bone funkcias kaj multe da gesamideanoj jam de nun faros ĉiun eblecon por partopreni al la proksima kongreso.

Dum niaj vintraj perfektigaj vesperoj, ni precipe oferdonos por formi kapablajn elementojn, kiuj post kelka tempo povos kunlabori al nia nobla kaj paca idealo.

« Ge-Pacaj Stelanoj » al la laboro ! Ni bezonas grandan nombron da novaj gekursanoj. Ke ĉiu faru sian plej grandan devon, alpor tante en la kursojn almenaŭ UNU novan elementon.

VICHTE.

Post la lasta leciono de S.ro Debrouwere, la gelernantoj de la kurso decidis fondi grupon. La 11-an de Septembro ili kunvenis en la komunuma lernejo por elekti estraron kaj fiksi laborplanon. S.ro Gerard Faveere, ĉefinstruisto, akceptis la funkcion de prezidanto kaj S.ro Valeer Vercaempst tiun de sekretario. La grupkunvenoj okazos en la lernejo ; por sin pliperfektigi en la elparolo, la grupanoj plejparte vizitos Cseh-kurson de S.ro Thien, ĉu en Kortrijk, ĉu en Wa-

Gratulo

Fileto, nomata Erik, venis feliĉigi niajn simpatiajn gemembrojn Vandendooren-Vandenberghe, Vanderlindenstraat, 125, Schaarbeek.

La Ligo kaj F. E. prezentas al la junaj gepatroj siajn plej korajn gratulojn !

La angulo de la serĉemuloj

Ni forlotumos 2 premiojn inter la solvintoj kiuj akiros la 8-10 de la poentoj. Ĉiu vorto valoras po 1 poento. La solvoj estu ensendataj antaŭ la 5a de Novembro 1936, rekte al S.ro F. Volders, Bredastraat, 94, Antwerpen.

Solvo de Problemo 9 : Solvu bone la problemojn kaj vi multe lernos ! Esperanto, lernanto, instruisto, vintro, bivako, mejlo, julio, blua, mal.

Premioj. Por Problemo 8 gajnis : S.ro Frank Taylor (Halifax) kaj F.ino L. Van den Broeck (Eindhoven).


Por problemo 9 gajnis : Fraŭlinoj Van de Ven kaj Stollman, el Eindhoven.

Ni ricevis premiojn de S.ro Alglave. Nian koran dankon ! Kiu sekvos ?

HORIZONTALA :

- 1) malŝati (senhonorigi) sanktajn objektojn (R) — korpoparto (R).
- 2) mordanto (R) — Vegetaĵo uzata kiel spicaĵo (R).
- 3) Lirika versaĵo (R) — granda akvujo (R) — vintra sportilo (R) — objekto (R).
- 4) Direkti pafon al la trafota objekto (R) — Peni plaĉi, allogi, per sia konduto (R) — vojo en ĝardeno (R).
- 5) Provizi por ĉio necesa (regimento, ŝipo, k. t. p.) (R) — emajlo (R) — korpoparto (R).

KRUCVORTENIGMO — PROBLEMO 12



- 6) Metala vazo por kuiri (R) — ŝteli (R).
- 7) Apliko de la teorio al la realeco (R).
- 8) Serpento (R) — nefermita kesteto (R).
- 9) Statuo honorata kiel Dio (R) — infano, naskito (R) — ĉevalrajdisto (R).
- 10) Gaso konsistanta el azoto kaj oksigeno (R) — publike sciigi (R) — dormmeblo.
- 11) Sen celo (mall) — fajro (figure) (R) — numeralo — kolekto (R).
- 12) Fluidaĵo (R) — koncernas la plej superan estajon (adj.).
- 13) Sciigi ion per vortoj (R) — necesajo por pesi (R).

VERTIKALE :

- 1) Tribunala afero (R) — monero (fremdlanda) (R).
- 2) numeralo — taŭgi (R).
- 3) metalo (R) — kapoparto (R) — fari truon (R) — numeralo.
- 4) Populare konata (R) — nacio (R) — flugilo.
- 5) Sin ĵeti kontraŭ iu por batali (R) — prepozicio — parto de cirko (R).
- 6) tasko de aktoro — sufikso (meriti).
- 7) Akvofalo.
- 8) Sensuka (R) — leviĝo kaj malleviĝo sur la supraĵo de moviĝanta fluidaĵo.
- 9) muzikmezuro (R) — subakva ŝtonego (R) — arbo (R).
- 10) Narkotajo (R) — manĝaĵo (R) — en kiu loko.
- 11) Pronomo — kreskaĵo (R) — korpoparto (al la kapo) (R) — ludkarto (R).
- 13) Aro (R) — oleosimila fluidaĵo uzata por lumigado (R).

FLANDRA LIGO ESPERANTISTA **(Vlaamsche Esperantisten - Bond)**

Voorzitter: H. Rainson, Hombeeksche steenweg, 54, Mechelen.
Ondervoorzitter: E. Cortvriendt, P. Van Humbeekstraat, 3, Brussel-West.
Sekretaris: Gerard Debrouwere, Magdalenastraat, 29, Kortrijk.
Penningmeester: Adolf De Keyzer, P. van Humbeekstr., 3, Brussel (West).
Propaganda: Gerard Lenaers, Willemstraat, Hamme.
Postcheck: Flandra Ligo Esperantista, Brussel, Nr 2321.50.
Orgaan: « Flandra Esperantisto », maandblad.
Lidmaatschap: 5 fr.; met maandblad: 25 fr.

AFDEELINGEN :

Aalst: « Pioniro ». Sekr.: Denderstraat, 20.
Antwerpen: « Flandrema Grupo Esperantista ». Sekr.: Statiestraat, 156, Berchem.
Brugge: « Katolika Junulara Esperanto-Grupo ». Guido Gezellelaan, 15.
Brussel: « Nia estas la Estonteco » (N.E.L.E.). Sekr.: P. van Humbeekstr., 3.
Kortrijk: « Esperantista Grupo ». Sekr.: Moeskroenstraat, 9.
Leuven: « Nova Tagiĝo » Sekr.: Tienschestraat, 106.
Oostende: « Ostenda Grupo Esperantista ». Sekr.: Oudenburgsche stwg., 8.
Mechelen: « La Estonto ». Sekr.: Vekestraat, 25.
Roeselare: « Ruselara Esperantista Grupo ».

VERTEGENWOORDIGERS :

Arendonk: A. De Troeyer, Gasthuisstraat, 98.
Assche: L. De Rop, Tenberg, 24.
Astene: M. Vanderlinden, Dorp, 54.
Gent: F-ino J. Terryn, Raapstraat, 82.
Harelbeke: A. Doornaert, Stasegemstraat, 97.
Mortsel: H. Van Durme, Eggestraat, 21.
Ronse: G. De Boes, Wijnstraat, 81.
Tielt: R. Plettinck, Steenweg naar Marialoop.
Vichte: G. Faveere, Statiestraat.
Wilrijk: D. Mortelmans, Egied Segerslaan, 14.

Ingevolge besluiten genomen tijdens de Kongresvergaderingen te Gent, betrekkelijk de werking en het beheer van den Bond, zijn al de groepen en vertegenwoordigers uitgenoodigd geworden hunne vraag tot aansluiting schriftelijk te vernieuwen.

Hierboven zijn alleen vermeld deze die hieraan gevolg gegeven hebben vóór 15 September. De andere zullen opgenomen worden in de volgende nummers.

Een oproep is ook gedaan tot de personen welke bereid zijn de taak van vertegenwoordiger te aanvaarden in de plaatsen waar F.L.E. er nog geen bezit. Toetredingsbulletijnen hiervoor mogen aangevraagd worden aan het sekretariaat.

OSTENDO

HOTELO METROPOLE

Kerkstraat, 32

75 komfortaj ĉambroj kun fluanta akvo, varma kaj malvarma. Centra hejtado. Lifto. Aŭtomobilejo. Kuirejo kaj kelo bonreputaciaj.

MODERAJ PREZOJ

S-ano Snykers havas la plej bonajn rekomendojn kaj persone direktadas.

OSTENDO Hotel-Restaurant VROOME

Bulvardo Rogier 20. Tel 37

Moderna komforto — Moderaj prezoj — Varma kaj malvarma akvo fluanta.

Prenu urbotramon 5 aŭ 6

« BREUGHEL »

SPIJS- en DRANKHUIS

Em. Jacquainlaan, 37, Brussel

Lekkere Dranken

Fame konata pro siaj bongustaj kaj malmultekostaj manĝoj

Ejo de N. E. L. E.

(Brusela grupo Esperantista)



Varbu

Abonantojn

kaj

Anoncantojn !

Speciale rekomendita Restoracio

„ La Renommée ”

St. Baafplaats, 3 — GENT — Tel. : 420.12

apud la Belfrido.

Estro VAN DER PLANCKEN persone direktas la kuirejon kaj prizorgos la festenon kaj lundan tagmangon de la

7a FLANDRA ESPERANTISTA KONGRESO

Huis aanbevolen door V. T. B.

« Presejo de l' Centro », Kipdorpevest, 26, Antwerpen.